

Kvin noveloj de Virginia Woolf (1882-1941) el *A Haunted House*, 1944. Tradukis Sten Johansson.

Enhavo:

La ĝardeno de Kew.....	2
La korda kvarteto.....	9
La viro kiu amis siajn similulojn.....	14
La sinjorino en la spegulo	20
La serĉlumo	26



La ĝardeno de Kew

(Kew Gardens, 1919)

El ovala florbedo eble cento da tigoj leviĝis, etendante koroformajn aŭ langoformajn foliojn duonvoje supren, kaj ĉepinte disvolvante ruĝajn, bluajn aŭ flavajn petalojn punktitaĵojn per koloraj makuloj reliefe sur la surfaco; kaj el la ruĝa, blua aŭ flava ombro de la gorĝo eliĝis rekta stameno malglata pro ora polvo kaj iom klaboforma ĉe la fino. La petaloj estis sufiĉe vastaj ke la somera brizo agitu ilin, kaj dum ili moviĝis, ruĝaj, bluaj kaj flavaj lumoj pasis unu super la alia kolorigante pecon da bruna tero sube per makulo el humida miksitaj koloro. La lumo falis jen sur la glatan, grizan dorson de ŝtoneto, jen sur la konkon de heliko kun ties brunaj, rondaj vejnoj, aŭ ĝi trafante pluvguton disigis ties maldikajn vandojn el akvo kun tia intenso de ruĝo, bluo kaj flavo, ke oni atendis ke ili krevos kaj malaperos. Anstataŭe, la guto post sekundo refoje iĝis arĝente griza, kaj la lumo nun trafis haŭton de folio, malkaŝante la disbranĉiĝon de ripa fibro subsurface, kaj denove ĝi moviĝis plu disigante sian prilumadon de la vasta verda tereno sub kupolo el koroformaj kaj langoformaj folioj. Poste brizo blovis eĉ pli vigle tie supre, kaj koloroj ŝprucis en la supran aeron, en la okulojn de viroj kaj virinoj, kiuj en julio promenas en la reĝa botanika ĝardeno de Kew.

La figuroj de tiuj viroj kaj virinoj vagis preter la florbedo en strange malregula moviĝado iom simila al tiu de la blankaj kaj bluaj papilioj, kiuj zigzage traflugis la gazonon de bedo al bedo. La viro promenis senzorge je duona paŝo antaŭ la virino, dum ŝi iris antaŭen pli celkonscie, nur jen kaj jen turnante la kapon por konstati, ke la infanoj ne tro longe postrestas. La viro konservis tiun distancon antaŭ la virino intence, kvankam eble nekonscie, ĉar li deziris daŭrigi pri siaj pensoj.

‘Antaŭ dek kvin jaroj mi venis ĉi tien kun Lily’, li pensis. ‘Ni sidis ie apud tiu fora lago, kaj dum la tuta varmega posttagmezo mi petadis ŝin edziniĝi al mi. Kiom la libelo daŭre

rondiradis ĉirkaŭ ni; kiel klare mi vidas la libelon kaj ŝian ŝuon kun la kvarangula arĝenta buko sur la pinto. Parolante mi senĉese vidis ŝian ŝuon, kaj kiam ĝi moviĝis senpacience, mi sciis sen rigardi supren, kion ŝi diros; ŝia tuta memo ŝajnis troviĝi en la ŝuo. Kaj mia amo, mia deziro, estis en la libelo; ial mi pensis, ke se ĝi surteriĝos ie, sur la folio, la larĝa folio kun ruĝa floro en la mezo, se la libelo surteriĝos sur tiu folio, ŝi tuj diros “Jes”. Sed la libelo pluiradis en rondo post rondo; ĝi neniam surteriĝis ie ajn – kompreneble ne, feliĉe ne, ĉar alie mi ne promenus ĉi tie kun Eleanor kaj la infanoj. Diru, Eleanor, ĉu vi iam pensas pri la pasinteco?’

‘Kial vi demandas, Simon?’

‘Ĉar mi ĵus pensis pri la pasinteco. Mi pensis pri Lily, la virino al kiu mi iam eble edziĝus ... Nu, kial vi silentas? Ĉu vi malŝatas, ke mi pensas pri la pasinteco?’

‘Kial mi malŝatu, Simon? Ĉu oni ne ĉiam pensas pri la pasinteco, en parko kun viroj kaj virinoj kuŝantaj sub la arboj? Ĉu ili ne estas nia pasinteco, ĉio kio restas el ĝi, tiuj viroj kaj virinoj, tiuj fantomoj kuŝantaj subarbe ... nia feliĉo, nia realo?’

‘Al mi, kvarangula arĝenta ŝubuko kaj libelo – ’

‘Al mi, kiso. Imagu ses knabinetojn sidantajn ĉe siaj pentrostabloj antaŭ dudek jaroj, flanke de la lago, pentrante akvoliliojn, la unuajn ruĝajn akvoliliojn, kiujn mi iam vidis. Kaj jen subite kiso, tie sur mia nuko. Kaj mia mano tremis dum la tuta posttagmezo, tiel ke mi ne povis pentri. Mi elpoŝigis mian horloĝeton por noti la horon, kiam mi permesos al mi pensi pri la kiso dum nur kvin minutoj – ĝi estis tiel valora – la kiso de grizhara maljunulino kun veruko surnaze, la patrino de ĉiuj kisoj en mia tuta vivo. Venu, Caroline, venu, Hubert.’

Ili paŝis plu preter la florbedo, nun jam promenante kvarope unu apud la alia, kaj baldaŭ ili malgrandiĝis inter la arboj kaj aspektis duone travideblaj, kiam la sunbrilo kaj ombro fluis super iliaj dorsoj kiel vastaj flikajoj malregule flagrantaj.

En la ovala florbedo la heliko, kies konko dum proksimume du minutoj estis kolorigita je ruĝo, bluo kaj flavo, jam ŝajnis iomete moviĝi en sia konko, kaj poste komencis lukti al si vojon

sur eroj el malkompakta humo, kiuj disrompiĝis kaj ruliĝis suben, kiam ĝi surpaŝis ilin. Ĝi ŝajne havis difinitan celon antaŭ si, tiurilate diferenca de la stranga anguleca verda insekto stilte paŝanta, kiu provis transiri antaŭ ĝi, sed atendis dum sekundo kun siaj tremantaj antenoj kvazaŭ konsiderante, kaj poste forpaŝis same rapide kaj strange en mala direkto. Brunaj klifoj kun profundaj verdaj lagoj en la kavoj, plataj, foliecaj arboj balanciĝantaj de radiko ĝis pinto, rondaj, grizaj ŝtonegoj, vastaj ĉifitaj surfacoj kun maldika, krevanta strukturo – ĉiuj ĉi aferoj kuŝis sur la vojo de la heliko inter unu tigo kaj alia ĝis ĝia celo. Antaŭ ol ĝi decidis, ĉu ĉirkaŭiri la volban tendon de mortinta folio aŭ ĉu alfronti ĝin, jen aperis preter la bedo piedoj de aliaj homoj.

Ĉi-foje ambaŭ estis viroj. La pli juna el la duopo havis mienon de trankvilo eble nenatura; li altigis sian rigardon kaj fiksas ĝin tre firme antaŭ si, dum lia akompananto parolis, kaj tuj kiam la akompananto finparolis, li denove rigardis la teron, kelkfoje malfermante la buŝon nur post longa paŭzo, aliffoje entute ne malfermante ĝin. La pli aĝa viro havis strange malregulan kaj skuan manieron paŝi, ĵetante la manon antaŭen kaj la kapon supren abrupte, pli-malpli laŭ la maniero de senpacienca tirĉevalo laca je atendado ekster domo; sed ĉe la viro tiuj gestoj estis maldecidemaj kaj sencelaj. Li parolis preskaŭ senĉese; li ridetis al si mem kaj rekomencis paroli, kvazaŭ la rideto estus respondo. Li parolis pri spiritoj – spiritoj de mortintoj, kiuj, laŭ li, eĉ nun rakontadis al li ĉiajn kuriozaĵojn pri siaj spertoj en la Ĉielo.

‘Al la antikvuloj la Ĉielo estis konata kiel Tesalio, William, kaj nun, pro la milito, la spirita afero ruliĝas inter montetoj kvazaŭ fulmotondro.’ Li paŭzis, ŝajnis aŭskulti, ridetis, ĵetis la kapon supren kaj daŭrigis:

‘Oni uzu etan elektran pilon kaj pecon da gumo por izoli la kablono – ĉu izoligi? – izoli? – nu, ni fajfu pri la detaloj, ne indas fiksiĝi en detaloj, kiujn neniu komprenus – kaj mallonge la eta aparato staru en ia ajn konvena pozicio ĉe la litokapo, ni diru, sur bela mahogana stablo. Kiam ĉiuj aranĝoj estos taŭge faritaj

de metiistoj sub mia gvidado, la vidvino almetos la orelon kaj vokos la spiriton per interkonsentita signalo. Virinoj! Vidvinoj! Virinoj en nigro – ’

Jen li ŝajne ekvidis la robon de iu fora virino, kiu en la ombro aspektis purpure nigra. Li levis la ĉapelon, metis manon sur la koron kaj rapidis direkte al ŝi murmurante kaj febre gestante. Sed William kaptis lin ĉe la maniko kaj tuŝis floron per la pinto de sia promenbastono por deturni la atenton de la maljunulo. Rigardinte ĝin dum momento en ioma konfuziĝo, la maljunulo turnis al ĝi la orelon kaj ŝajne respondis al voĉo parolanta el ĝi, ĉar li ekparolis pri la arbaroj de Urugvajo, kiujn li vizitis antaŭ jarcentoj en akompano de la plej bela juna virino de Eŭropo. Oni povis aŭdi lin murmuri pri arbaroj de Urugvajo kovritaj de vaksaj petaloj de tropikaj rozoj, najtingaloj, apudmaraj strandoj, marvirinetoj kaj virinoj dronintaj enmare, dum li mem lasis sin pluigi de William, sur kies vizaĝo la mieno de stoika pacienco iom post iom profundiĝis.

Du aĝaj virinoj de malalta meza klaso sekvis liajn paŝojn tiel proksime, ke ili leĝere konsterniĝis pro liaj gestoj. Unu el ili estis fortika kaj plumpa, la dua rozvanga kaj vigla. Same kiel la plej multaj homoj de ilia socia klaso, ili estis sincere fascinitaj pro ĉiu ajn signo de ekstravaganco venanta el misorda cerbo, precipe ĉe bonstata persono; sed ili estis tro malproksimaj por certiĝi, ĉu la gestoj estas nur ekstravagancaj aŭ vere frenezaj. Silente ekzameninte la dorson de la maljunulo dum kelka tempo kaj direktinte inter si rigardojn misterajn kaj ruzajn, ili pluiris, energie kompilante sian ege komplikan dialogon:

‘Nell, Bert, Lot, Cess, Phil, Paĉjo, li diris, mi diris, ŝi diris, mi diris, mi diris – ’

‘Mia Bert, Franjo, Bill, Avo, la maljunulo, sukero,
Sukero, faruno, haringoj, legomoj,
Sukero, sukero, sukero.’

La plumpulino kun scivola mieno rigardis tra la pluvo el vortoj al la floroj, kiuj staris sur la tero trankvile, firmdecide kaj malcedeme. Ŝi rigardis ilin kiel dorminto vekigante el profunda dormo rigardas latunan kandelington, kiu reflektas lumon en

ne kutima maniero, kaj fermas la okulojn, kaj remalfermas ilin, kaj revidante la kandelingon fine plene vekigâs kaj ekgapas al la kandelingo per ĉiuj fortoj. Tiel la peza virino ekhaltis kontraŭ la ovala florbedo kaj ĉesis eĉ ŝajnigi aŭskulti, kion diras la alia virino. Jen ŝi staris lasante la vortojn pluvadi sur ŝin, balancante la supran parton de sia korpo malrapide dorsen kaj antaŭen, rigardante la florojn. Fine ŝi proponis, ke ili trovu sidlokon por ricevi sian teon.

La heliko jam konsideris ĉiun eblan metodon por atingi sian celon sen ĉirkaŭiri la mortintan folion nek supergrimpi ĝin. Krom la forto necesa por grimpi sur folion, ĝi pridubis ankaŭ, ĉu la maldika surfaco vibranta kun tiel minaca krakado je ektuŝo, eĉ per la pinto de ĝiaj kornoj, subtenus ĝian pezon; kaj tio finfine konvinkis ĝin rampi sub ĝi, ĉar ĉe unu punkto la folio kurbiĝis sufiĉe alten super la grundo por enlasi ĝin. Ĝi ĵus enŝovis la kapon en la aperturon kaj nun pritaksis la altan brunan plafonon kaj alkutimiĝadis al la friska bruna lumo, kiam du aliaj homoj preterpasis ekstere sur la gazono. Ĉi-foje ili ambaŭ estis junaj, juna viro kaj juna virino. Ili ambaŭ estis ĉe la zenito de junaĝo, aŭ eĉ en la sezono antaŭ la zenito de junaĝo, la sezono antaŭ ol la glataj rozaj faldaĵoj de floro disrompas sian gluecan tegajon, kiam la flugiloj de papilio, kvankam plene kreskintaj, restas senmovaj en la sunbrilo.

‘Bonŝance, ke ne estas vendredo’, li rimarkigis.

‘Kial? Ĉu vi kredas je ŝanco?’

‘Vendrede oni devas pagi ses pencojn.’

‘Kiom gravas ses pencoj, ĉiuokaze? Ĉu ĉi tio ne valoras ses pencojn?’

‘Kio estas “ĉi tio” – kion vi volas diri per “ĉi tio”?’

‘Nu, ion ajn – mi celas – vi scias, kion mi celas.’

Longaj paŭzoj venis inter ĉiu el tiuj rimarkigoj; ili estis prononcataj per malsonoraj kaj monotonaj voĉoj. La duopo staris senmove ĉe rando de la florbedo kune premante la pinton de ŝia sunombrelo profunde suben en la molan teron. Tiu ago kaj la fakto, ke lia mano ripozis sur la ŝia, esprimis iliajn sentojn en stranga maniero, same kiel tiuj mallongaj signifikaj vortoj

esprimis ion, vortoj kun flugiloj tro mallongaj por sia peza korpo de senco, ne sufiĉaj por porti ilin foren, kaj sekve ili surteriĝis maloportune sur la tre ĉiutagaj aferoj ĉirkaŭantaj ilin, aferoj tre rezistaj al ilia malsperta tuŝo; sed kiu scias (jen kiel ili pensis, premante la ombrelon en la teron) kiaj abismoj eble kaŝiĝas en ili, aŭ kiaj glaciaj deklivoj eble brilas en la suno trans ili? Kiu scias? Kiu iam ajn jam vidis ĉi tion? Eĉ kiam ŝi demandis, kian teon oni prezentas en la ĝardeno, li sentis ion embuski malantaŭ ŝiaj vortoj, ion vastan kaj solidan malantaŭ ili; kaj la nebulo tre malrapide altiĝis malkaŝante – ho, ĉielo, kio estas tiuj formoj? – etajn blankajn tablojn, kaj kelnerinojn, kiuj rigardas unue ŝin kaj poste lin; kaj jen kalkulo kiun li pagos per vera duŝilingo, kaj ĝi estas vera, tute vera, li certigis al si palpante la moneron enpoŝe, vera al ĉiu krom al li kaj al ŝi; eĉ al li ĝi jam ekŝajnis vera; kaj tiam – sed estis tro ekscite plu stari pensante, kaj per ektiro li eligis la sunombrelon el la tero kaj malpacience serĉis la lokon, kie eblis ricevi teon kun aliaj homoj, kiel aliaj homoj.

‘Venu, Trissie; jam estas tempo ke ni trinku nian teon.’

‘Kie efektive eblas trinki teon?’ ŝi demandis kun stranga tremo de ekscito en sia voĉo, rigardante malprecize ĉirkaŭ si kaj lasante sin konduki pluen laŭ la herbopado, trenante sian sunombrelon, turnante la kapon tien kaj ĉi tien forgesante sian teon, volante iri jen ien, jen aliloken, memorante orkideojn kaj gruojn inter la sovaĝaj floroj, ĉinan pagodon kaj birdon kun sangruĝa kresto; sed li pluigis ŝin.

Tiel do unu duopo post la alia preterpasis la florbedon kun pli-malpli same malregula kaj sencela moviĝado kaj envolviĝis en tavolon post tavolo de verde-blua vaporo, en kiu iliaj korpoj komence posedis substancon kaj guton da koloro, sed poste kaj substanco kaj koloro solviĝis en la verde-blua atmosfero. Kiel varmege estis! Tiel varmege, ke eĉ turdo preferis salteti kiel mekana birdo en la ombro de floroj, kun longaj paŭzoj inter unu moviĝo kaj la sekva; anstataŭ vagi malprecize, la blankaj papilioj dancis unu super la alia, formante per siaj blankaj ŝanĝiĝemaj flokoj konturon de disrompita marmora kolono super la plej altaj floroj; la vitra tegmento de la palmdomo brilis,

kvazaŭ malfermiĝus en la suno tuta bazaro plena je brile verdaj ombreloj; kaj en la zumado de aeroplano la voĉo de la somera ĉielo murmuris per sia sovaĝa animo. Flavo kaj nigro, rozkoloro kaj neĝblanko, figuroj de ĉiuj ĉi koloroj, viroj, virinoj kaj infanoj dum sekundo vidiĝis ĉehorizonte, kaj poste, vidante la vaston de flavo kuŝanta sur la herbejo, ili cedis kaj serĉis ombron sub la arboj, solviĝante kiel akvogutoj en la flava kaj verda atmosfero, iom makulante ĝin per ruĝo kaj bluo. Ŝajnis ke ĉiuj plumpaj kaj pezaj korpoj senmove sinkis suben en la varmego kaj kuŝis en amaso surtere, sed iliaj voĉoj plu flagris el ili kvazaŭ ili estus flamoj eligantaj el la dikaj vakskorpoj de kandeloj. Voĉoj. Jes, voĉoj. Senvortaj voĉoj, kiuj subite rompis la silenton kun tiel profunda kontento, tiel pasia deziro, aŭ, en la voĉoj de infanoj, tiel freŝa surprizo; ĉu rompis la silenton? Sed estis nenia silento; senĉese la motoraj aŭtobusoj movis siajn radojn kaj ŝanĝis siajn rapidumojn; kiel vasta serio el ĉinaj skatoloj, ĉiuj el forĝita ŝtalo, senhalte turniĝante unu en la alia, la urbego murmuris; super kio la voĉoj kriis laŭte kaj la petaloj de miriado da floroj ŝprucigis siajn kolorojn en la aeron.

La korda kvarteto

(The String Quartet, 1921)

Nu, jen ni estas, kaj se oni ĵetas rigardon tra la salono, oni komprenos, ke metroo kaj tramoj kaj omnibusoj, ne malmulte da privataj veturiloj, eĉ, mi aŭdacas kredi, landaŭoj kun internaj fakoj, estis urĝe okupitaj teksante fadenojn de unu fino de Londono ĝis alia. Tamen mi jam komencas dubi –

Se oni efektive pravos dirante, ke la strato Regent Street estas disfosa, kaj la Traktato subskribita, kaj la vetero ne tro malvarma por la sezono, kaj ke ne eblas akiri apartamenton eĉ je iu ajn luprezo, kaj la plej malbona afero pri gripo estas la postefikoj; se mi pripensas, ke mi forgesis atentigi pri la liko en la manĝoprovizado, kaj ke mi postlasis ganton en la vagonaro; se samsangeco devigas min, kliniĝante antaŭen, kore premi manon eble hezite proponatan –

‘Pasis sep jaroj de kiam ni renkontiĝis!’

‘Lastfoje en Venecio.’

‘Kaj kie vi nun vivas?’

‘Nu, plej konvenas al mi malfrue posttagmeze, kvankam, se tio ne estus troa deziro –’

‘Sed mi tuj rekonis vin!’

‘Tamen la milito estis interrompo –’

Se tiaj saĝetoj trapafas la menson, kaj – ĉar la homa kunestado tion neprigas – apenaŭ unu estas elpafita, jen alia altrudas sin; se ĉi tio generas varmegon, kaj aldone oni jam ŝaltis la elektran lumon; se la eldirado de unu afero en multaj okazoj postlasas bezonon plibonigi kaj prilabori ĝin, moviĝante inter bedaŭroj, ĝuoj, vantaĵoj kaj deziroj – se prezentas sin ĉiuj ĉi faktoj, kiujn mi celas, kaj la ĉapeloj, la peltaj boaoj, la frakoj kaj perlaĵoj kravatpingloj de la sinjoroj – do kiom da ŝanco ekzistas?

Je kio? Ĉiumomente kreskas la malfacilo klarigi, kial mi malgraŭ ĉio sidas ĉi tie, kredante mi nun ne povas diri kion, aŭ eĉ memori, kiam tio okazis la antaŭan fojon.

‘Ĉu vi spektis la procesion?’

‘La reĝo ŝajnis malvarma.’

‘Ne, ne, ne. Sed kio estis?’

‘Ŝi aĉetis domon en Malmesbury.’

‘Kia bonŝanco trovi tion!’

Male, al mi ŝajnas sufiĉe evidente ke ŝin, kiu ajn ŝi povas esti, trafis malbena, ĉar ĉio temas pri loĝejoj kaj ĉapeloj kaj mevoj, aŭ tiel ŝajnas al la centoj da homoj sidantaj ĉi tie bele vestitaj, enfermitaj, peltohavaj, sategaj; kvankam mi ne povas fanfaroni, ĉar ankaŭ mi sidas pasive sur orita seĝo, nur fosante en la tero super entombigita memoro, kiel ni ĉiuj faras, ĉar troviĝas signoj, se mi ne trompiĝas, ke ni ĉiuj revokas ion, kaŝe serĉas ion. Kial do maltrankvili? Kial tiom zorgi pri kiel konvenas manteloj; kaj pri gantoj – ĉu butoni aŭ malbutoni? Plue rigardu tiun maljunan vizaĝon kontraŭ malhela tolo, antaŭ momento arda kaj monduma; nun trista kaj silenta, kvazaŭ en ombro. Ĉu tio estis sono de la dua violono agordata en la antaŭĉambro? Jen ili; kvar nigraj figuroj, kiuj portas instrumentojn kaj sidiĝas fronte al la blankaj kvadratoj sub la radiantaj lumoj; ili apogas la arĉopintojn al la notstablo, levas ilin per samtempa movo, tenas ilin en leĝera ekvilibro, kaj jen la unua violonisto, rigardante al la kontraŭa ludanto, kalkulas un’, du, tri –’

Floru, ĝermu, burĝonu, krevu! La pirarbo sur montopinto. Fontanoj ŝprucigas; gutoj falas. Sed la akvo de Rodano fluas vigle kaj profunde, rapidas sub arkoj kaj balaas la sinuajn algojn, banante ombrojn super arĝentaj fiŝoj; makulitaj fiŝoj portataj malsupren de la vigla akvo, nun volvataj en kirlaĵon, kie – jen malfacilaĵo – konglomeriĝas fiŝoj en profundaĵo; saltante, plaŭdante, skrapante per akraj naĝiloj; kaj tiel bolanta fluo, ke flavaj ŝtonetoj estas kirlataj en senĉesa rondo, ĉiama rondo – jen liberaj, rapidante malsupren, iel eĉ supren laŭ delikataj spiraloj en la aeron; bukaj kiel maldikaj lignobendoj el rabotilo; ĉiam

supren ... Kiel ĉarma estas la boneco ĉe tiuj, kiuj facilpiede kaj ridetante trapaŝas la mondon! Kaj same ĉe gajaj maljunaj fiŝistedzinoj, sidantaj sub arkoj, maldecaj oldulinoj, kiel profunde ili ridas kaj tremas kaj petolas, paŝante de flanko al flanko, hm, ho!

‘Evidente jen frua Mozartaĵo –’

‘Sed la melodio, kiel ĉiuj liaj melodioj, igas desperi – mi volas diri esperi. Kion mi volas diri? Jen la plej malfacila afero pri muziko! Mi volas danci, ridi, manĝi rozkolorajn kukojn, flavajn kukojn, trinki malpezan, akran vinon. Aŭ maldecan anekdoton nun – mi aprezus tion. Ju pli oni maljuniĝas, des pli oni ŝatas maldecon. Ha, ha! Mi ridas. Je kio? Vi diris nenion, nek la maljuna sinjoro kontraŭe ... Sed supozu – supozu – Ŝŝ!’

La rivero de melankolio portas nin for. Kiam la luno lumas tra pendantaj salikbranĉoj, mi vidas vian vizaĝon, mi aŭdas vian voĉon kaj la kantantajn birdojn dum mi preterpasas la vimenplantejon. Kion vi flustras? Triston, triston. Ĝojon, ĝojon. Kunteksitajn kiel kanoj en lunlumo. Kunteksitajn, nedisigeble miksitajn, kunligitajn en doloro kaj disŝutitajn en malĝojo – kraŝ!!

La boato sinkas. La figuroj stariĝas por supreniri, sed nun folie maldikaj, ili reduktiĝas en krepuskan fantomon, kies pinto fajre lumas, kaj kiu ĉerpas sian duoblan pasion el mia koro. Al mi ĝi kantas, malsigelas mian triston, degeligas kompaton, inundas la sensunan mondon per amo, kaj ĉesante ĝi ne malpliigas sian tenerecon, sed lerte, subtile, teksas enen kaj elen ĝis en ĉi strukturo, en ĉi plenumo, la disigitaj unuiĝas; soras, ploras, sinkas por ripozi, tristo kaj ĝojo.

Do, kial malĝoji? Kion demandi? Ĉu resti malkontenta? Nu, sed ĉio estas decidita; jes, ĉio jam ripozas sub kovrilo el falantaj rozpetaloj. Falantaj. Ho, sed ili ĉesas. Unu rozpetalo falanta de grandega alto, kvazaŭ eta paraŝuto faligita de nevidebla balono, turniĝas, flirtas hezite. Ĝi ne atingos nin.

‘Ne, ne, mi rimarkis nenion. Jen la plej malbona afero pri muziko – tiuj stultaj revoj. Do, laŭ vi la dua violono malfruis, ĉu?’

‘Jen la maljuna sinjorino Munro, kiu palpserĉas sian vojon eksteren – ĉiujare pli blinda, la povrulino, sur ĉi tiu glita planko.’

Nevidanta maljunaĝo, grizhara sfinkso ... Jen ŝi staras surtrotuare, signante severmiene al ruĝa omnibuso.

‘Kiel ĉarme! Kiel bone ili ludas! Kiel – kiel – kiel!’

La lango estas nura klakilo. Pura naiveco. La plumoj de la ĉapelo apud mi estas brilaj kaj plaĉaj kiel la klakileto de infano. La folioj de platano fulmas verde tra fendo en la kurteno. Tre strange, tre ekscite.

‘Kiel – kiel – kiel! Ŝŝ!’

Jen geamantoj sur herbejo.

‘Sinjorino, bonvolu preni mian manon –’

‘Sinjoro, mi konfidus al vi mian koron. Cetere, ni lasis niajn korpojn en la bankedejo. Tiuj surherbe estas la ombroj de niaj animoj.’

‘Do, jen la brakumoj de niaj animoj.’

La citronoj kapjesas. La cigno puŝas sin for de la bordo kaj reveme flosas en la mezan fluon.

‘Sed por reveni. Li sekvis min tra la koridoro, kaj kiam ni preterpasis la angulon, li tretis sur la punton de mia subjupo. Kion mi povus fari, krom voki ‘Ho!’ kaj halti por palpesplori ĝin? Je tio li elingigis sian glavon, ekpuŝis kvazaŭ mortpikante ion, kaj kriis ‘Freneza! Freneza! Freneza!’ Tiam mi ŝrikis, kaj la princo skribanta en granda velena libro ĉe la korbela fenestro aperis en sia velura ĉapeto kaj peltaj pantofloj, kaptis rapiron de la muro – donaco de la hispana reĝo, ĉu ne – je kio mi eskapis, ĵetante sur min ĉi tiun mantelon por kaŝi la ŝiraĵojn de mia jupo – por kaŝi ... Sed aŭskultu! Jen la kornoj!’

La sinjoro respondas tiel rapide al la sinjorino, kaj ŝi supreniras la skalon kun tia sprita interŝanĝo de ĝentilaĵoj nun kulminanta en pasia plorsingulto, ke la vortoj ne distingeblas, kvankam ilia senco estas sufiĉe klara – amo, rido, fuĝo, persekuto, ĉiela feliĉo – ĉio disfluanta en la plej gajan lirladon el teneraj amkomplezoj – ĝis la sono de arĝentaj kornoj, unue malproksima, iom post iom aŭdiĝas pli kaj pli klare, kvazaŭ

seneskaloj salutus la tagiĝon aŭ misaŭgure heroldus la eskapon de geamantoj ... La verda ĝardeno, la baseno prilumata de la luno, la citronoj, geamantoj kaj fiŝoj, ĉiuj dissolviĝas en la opala ĉielo, tra kiu, dum al la kornoj aliĝas trumpetoj kun subteno de klarnetoj, altiĝas blankaj arkoj firme lokitaj sur marmoraj kolonoj ... Tretado kaj trumpetado. Tintado kaj tintinado. Firma fondaĵo. Fiksaj fundamentoj. Marŝo de miriadoj. Konfuzo kaj kaoso tretata al la grundo. Sed ĉi urbo, al kiu ni vojaĝas, havas nek ŝtonojn nek marmoron; rezistas daŭre; staras neŝanceble; neniu vizaĝo, neniu flago salutas nek bonvenigas. Do lasu vian esperon neniigi; velku en dezerto mia ĝojo; pluiru nuda. La kolonoj nudas, bonaŭguraj al neniu, ĵetante neniun ombron, brilaj, severaj. Do mi retretas, ne plu fervora, dezirante nur foriri, trovi la straton, noti la konstruaĵojn, saluti la pomvendistinon, diri al la servistino, kiu malfermas la pordon: Kia stelplena nokto.

‘Bonan nokton, bonan nokton. Ĉu vi iros ĉi tien?’

‘Bedaŭrinde ne. Mi iros tien.’

La viro kiu amis siajn similulojn

(The Man Who Loved His Kind, 1925, publikigita en 1944)

Survoje tra Deans Yard en tiu posttagmezo, Pricket Ellis kunpuŝiĝis kun Richard Dalloway, aŭ pli ĝuste, preterpasante unu la alian, ili ĵetis inter si kaŝajn flankrigardojn, sub lian ĉapelon, trans lian ŝultron, kiuj vastiĝis kaj ŝanĝiĝis en rekonon; jam de dudek jaroj ili ne renkontiĝis. Iam ili frekventis la saman lernejon. Do, kion faras Ellis? Ĉu en tribunalo? Kompreneble, kompreneble – li sekvis la juĝaferon en ĵurnaloj. Sed ne eblas interparoli ĉi tie. Ĉu li ne povus veni vizite ĉi-vespere? (Ili vivis samloke kiel ĉiam – nur trans la angulo.) Venos unu-du homoj. Eble Joynson. ‘Jen terura gravulo nuntempe’, diris Richard.

‘Bone – do ĝis ĉi-vespere’, diris Richard pluirante, diable ĝoja (jen la pura vero) ke li renkontis tiun kuriozulon, kiu tute ne ŝanĝiĝis post la lerneja tempo – tutsama tubera, rondeta knabeto tiam, kun okulfrapaj opinioj pri ĉio ajn, sed nekutime brila – li gajnis la premion de Newcastle. Nu – li jam malaperis.

Pricket Ellis, turnante sin por rigardi la malaperantan Dalloway, tamen nun preferus ne renkonti lin, aŭ almenaŭ, ĉar li ĉiam ŝatis lin persone, ne promesi al li, ke li venos al tiu festeno. Dalloway estis edzo, aranĝis festenojn; li tute ne estis de lia speco. Necesos vesti sin solene. Tamen, kiam la vespero alproksimiĝis, li supozis ke li devas iri tien, dirinte ke jes kaj ne volante kondukti malĝentile.

Sed kia terura distraĵo! Jen Joynson; ili havis nenion por diri unu al la alia. Li estis fieraĉa knabeto; li plenkreskis eĉ pli memfiera – jen ĉio; en la ĉambro estis neniu alia homo konata al Pricket Ellis. Eĉ ne unu. Do, ĉar ne eblis tuj foriri, dirinte nenion al Dalloway, kiu ŝajnis plene okupita de siaj devoj, kurante tienreen en blanka veŝto, li simple devis resti. Jen afero kiu naŭzis lin. Imagu plenkreskajn, respondecajn virojn kaj virinojn, kiuj faras ĉi tion ĉiuvespere dum siaj vivoj! La sulkoj de liaj bluruĝaj razitaj vangoj profundigis, dum li klinis sin al muro en

absoluta silento, ĉar kvankam li laboris kiel sklavo, li zorgis resti bone trejnita; kaj li aperis malmola kaj sovaĝa, kvazaŭ liaj lipharoj estus trempitaj en prujno. Li hirtis; li grincis. Lia modesta vesto donis al li aspekton malzorgitan, sensignifan, mallertan.

Nenifaraj, babilantaj, tro lukse vestitaj, sen eĉ unu ideo en la kapoj, tiuj belaj sinjorinoj kaj sinjoroj daŭrigis paroli kaj ridi; kaj Pricket Ellis rigardis ilin komparante ilin kun la gesinjoroj Brunner, kiuj, gajninte juĝaferon kontraŭ la bierfarejo de Fenners kaj ricevinte kompenson de ducent pundoj (kio estis eĉ ne duono de tio, kion ili devus ricevi), elspezis kvin el tiuj por donaci al li horloĝon. Jen iel taŭga maniero agi; jen afero, kiu kortuŝis lin, kaj li gapis pli severe ol iam al ĉi tiuj homoj, tro lukse vestitaj, cinikaj, prosperaj, komparante kion li nun sentas kun tio, kion li sentis je la deknua horo matene, kiam la maljuna Brunner kaj lia edzino en siaj plej bonaj vestoj, terure respektindaj kaj puraspektaj, vizitis lin por donaci al li tiun etan memoraĵon, kiel diris la maljunulo, starante tute rekta por fari sian paroladon, pro nia dankemo kaj respekto al la tre lerta maniero, laŭ kiu vi plenumis nian aferon, kaj sinjorino Brunner aŭdigis sin, ke laŭ ili ĉio estas dank' al li. Kaj ili profunde aprezis lian malavarecon – ĉar, kompreneble, li ne postulis honorarion.

Kaj prenante la horloĝon por meti ĝin meze sur sian kamenbreton, li esperis, ke neniu vidas lian vizaĝon. Jen pro kio li laboris – jen lia rekompenco; kaj li rigardis la homojn efektive troviĝantajn antaŭ liaj okuloj, kvazaŭ ili dancus en tiu sceno en liaj ĉambroj kaj estus malkaŝitaj de ĝi, kaj kiam ĝi fadis – la gesinjoroj Brunner fadis – restis kiel spuro de tiu sceno li mem, frontante ĉi tiujn malamikajn homojn, viro absolute simpla, senafekta, viro el la popolo (li rektigis sin) tre malbone vestita, gapanta, sen ia ajn nobleco aŭ ĉarmo, viro mallerta pri kiel kaŝi siajn sentojn, viro simpla, homo ordinara, kiu kontraŭas la malbonon, la koruptecon, la senkoran socion. Sed li ne plu gapos. Nun li surmetis siajn okulvitrojn por ekzameni la bildojn surmure. Li legis la titolojn de vico da libroj; plejparte poezio.

Li suffiĉe ŝatus refoje legi ion el siaj preferatoj – Shakespeare, Dickens – plaĉus al li havi tempon iam viziti la Nacian Galerion, sed li ne povis – ne, tio ne eblis. Vere tio ne eblis, dum la mondo restas en ĉi tia stato. Ne eblis, dum homoj plenajn tagojn atendas lian helpon, dum ili juste alvokas helpon. Nun ne estis tempo por luksaĵoj. Kaj li rigardis la fotelojn kaj la papertranĉilojn kaj la bele binditajn librojn, skuante la kapon, sciante ke li neniam havos tempon, neniam la senkompaton necesan por permesi al si tiajn luksaĵojn – tiel li ĝojis pensi. La homoj ĉi tie ŝokiĝus, eksciante kiom li pagas por sia tabako; kiel li prunteprenis sian veston. Lia unusola ekstravaganco estis lia eta jaĥto en la estuaro de Norfolk. Tion li efektive permesis al si. Plaĉis al li unufoje jare forlasi ĉion por kuŝi surdorse en herbejo. Li pensis pri tio, kiel ŝokitaj ili estus – ĉi tiuj anoj de la mondumo – komprenante, kiom da plezuro li ricevas el tio, kion li en sia eksmoda maniero nomas amo al la naturo; al arboj kaj kampoj, kiujn li konas jam de sia knabaĝo.

Ĉi tiu mondumo ŝokiĝus. Vere, starante tie, enpoŝigante siajn okulvitrojn, li sentis ke en ĉiu momento li iĝas pli kaj pli ŝoka. Kaj tio estis sento tre malagrable. Li ne sentis ĉi tion – ke li amas la homaron, ke li pagas nur kvin penceojn por unco da tabako kaj amas la naturon – en maniero natura kaj trankvila. Ĉiu el tiuj plezuroj transformiĝis en proteston. Li sentis, ke tiuj homoj, kiujn li malestimas, devigas lin pravigi kaj senkulpigi sin. ‘Mi estas ordinara viro’, li ripetis. Kaj pri la sekva diraĵo li vere hontis, tamen li eldiris ĝin. ‘Mi faris pli multe por miaj similuloj en unu tago, ol vi ceteraj dum viaj tutaj vivoj.’ Efektive li ne povis haltigi sin; li plu revokis unu scenon post alia, kiel tiun kiam la gesinjoroj Brunner donacis al li la horloĝon – li plu memorigis al si la afablajn vortojn, kiujn homoj diradis pri lia homeco kaj malavareco, pri kiel li helpis al ili. Li daŭre rigardis sin saĝa kaj tolerema servanto de la homaro. Kaj li dezirus povi laŭte ripeti la ricevitajn laŭdojn. Estis malagrable, ke lia sento de boneco devas boli en lia interno. Estis eĉ pli malagrable, ke li povas rakonti al neniu, kion homoj diris pri li. Dank’ al Dio, li ripetis, morgaŭ mi

revenos al mia laboro; kaj tamen li ne plu estus kontenta nur elgliti tra la pordo por iri hejmen. Li devis resti; li devis resti ĝis li pravigos sin. Sed kiel tio eblos? En tiu tuta ĉambro plena je homoj, li konis neniun al kiu paroli.

Fine Richard Dalloway venis al li.

‘Mi ŝatus prezenti al vi fraŭlinon O’Keefe’, li diris. Fraŭlino O’Keefe rigardis rekte en liajn okulojn. Ŝi estis virino tridekkelkjara, sufiĉe aroganta, kun senceremonia sinteno.

Fraŭlino O’Keefe deziris glaciaĵon aŭ ion por trinki. Kaj la kaŭzo, kial ŝi petis al Pricket Ellis alporti ĝin al ŝi en maniero, kiun li trovis orgojla kaj nepardonebla, estis ke en tiu varmega posttagmezo ŝi vidis virinon kun du infanoj, tre malriĉaj, tre lacaj, premi sin al la barilo de ĝardenplaco, rigardante enen. Ĉu ne eblus enlasi ilin? Ŝi pensis, dum ŝia kompatato leviĝis kiel ondo; bolis ŝia indigno. Ne; en la sekva momento ŝi riproĉis sin, malmilde, kvazaŭ donante al si vangofrapon. Eĉ la plena potenco de l’ mondo ne povus fari tion. Do ŝi levis la tenispilkon kaj reĵetis ĝin. La plena potenco de l’ mondo ne povas fari tion, ŝi diris furioze, kaj jen kial ŝi diris tiel ordone al la nekonato:

‘Donu al mi glaciaĵon.’

Longe antaŭ ol ŝi finmanĝis ĝin, Pricket Ellis, starante apud ŝi nek manĝante nek trinkante, rakontis al ŝi, ke de dek kvin jaroj li ne iris al festeno; rakontis al ŝi, ke lia kostumo estas pruntedonita al li de lia bofrato; rakontis al ŝi, ke ĉi tiaj aferoj ne plaĉas al li; kaj li sentus grandan malpeziĝon daŭrigi dirante, ke li estas simpla viro, kiu ial preferas ordinarajn homojn, kaj plue li rakontus al ŝi (pro kio li poste hontus) pri la gesinjoroj Brunner kaj la horloĝo, sed ŝi diris:

‘Ĉu vi jam spektis la Ŝtormon?’ Kaj poste (ĉar li ne spektis la Ŝtormon), ĉu li legis iun libron? Denove ne, kaj tiam, metante sian glaciaĵon surtablen, ĉu li neniam legas poezion?

Kaj Pricket Ellis, sentante en si ion leviĝi, kio senkapigus ĉi tiun junan virinon, viktimitigis ŝin, masakrus ŝin, petis ŝin sidiĝi tie, kie oni ne interrompos ilin, sur du seĝoj en la senhoma ĝardeno, ĉar ĉiuj estis en la supra etaĝo, oni aŭdis nur zumadon kaj murmuradon kaj babiladon kaj tintadon, similan al la freneza

akompanado de ia fantoma orkestro al unu aŭ du katoj ŝtelirantaj tra la gazono, kaj flirtadon de folioj, kaj la svingiĝadon tien-reen de ĉinaj lampionoj similaj al flavaj kaj ruĝaj fruktoj – la interparolo ŝajnis furioza dancmuziko de skeletoj, akompananta ion tute veran kaj plenan je sufero.

‘Kiel bele!’ diris fraŭlino O’Keefe.

Ho, ĝi ja estis bela, tiu peceto da herboj, kun la turoj de Westminster nigre elstarante ĉirkaŭ ĝi, ĝisĉiele altaj, post la salono; estis silente, post tiu bruado. Almenaŭ tion ili havis – la laca virino, la infanoj.

Pricket Ellis ekbruligis pipon. Tio ja ŝokos ŝin; li ŝtopis ĝin per tabakaĉo je kvin pencoj kaj duono por unco. Li imagis, kiel li kuŝos fumante en sia boato, li povis vidi sin sola, nokte, fumanta sub la steloj. Ĉar senĉese ĉi-vespere li pensadis pri kiel li aspektus, se la homoj ĉi tie vidus lin. Li diris al fraŭlino O’Keefe, frotante alumeton kontraŭ la plandumo de sia boto, ke li povas vidi nenion aparte belan ĉi-ekstere.

‘Eble’, diris fraŭlino O’Keefe, ‘vi ne zorgas pri beleco.’ (Li jam diris al ŝi, ke li ne spektis la Ŝtormon; ke li ne legis libron; li aspektis misflegita, nur lipharoj, mentono kaj arĝenta horloĝoĉeno.) Ŝi pensis, ke neniu devas pagi eĉ pencon por ĉi tio; la muzeoj estas senkostaj kaj la Nacia Galerio; kaj la kamparo. Kompreneble ŝi konsciis pri la objetoj – lavado, kuirado, infanoj; sed la bazo de ĉio, kion ili ĉiuj timis diri, estis ke feliĉo estas ege malmultekosta. Eblas akiri ĝin kontraŭ nenio. Belecon.

Tiam Pricket Ellis turnis sin kontraŭ ŝi – tiu pala, senceremonia, aroganta virino. Li rakontis al ŝi, fumante sian tabakaĉon, kion li faris tiutage. Ellitiĝis je la sesa; faris intervjuojn; flaris kloakon en malpura slumo; poste iris al la tribunalo.

Jen li hezitis, volante rakonti al ŝi iom el siaj propraj atingoj. Subpremante tion, li estis eĉ pli sarkasma. Li diris, ke naŭzas lin aŭdi virinojn bone nutritajn, bone vestitajn (ŝi kunpremis la lipojn, ĉar ŝi estis svelta, kaj ŝia robo ne estis altnivela) paroli pri beleco.

‘Beleco!’ li diris. Li bedaŭris, ke li ne komprenas belecon krom ĉe homoj.

Do ili gapis en la senhoman ĝardenon, kie lanternoj balanciĝis, kaj kato hezitis en la mezo kun levita piedo.

Beleco krom ĉe homoj? Kion li volas diri per tio? ŝi subite demandis.

Nu, ĉi tion: pli kaj pli incite li rakontis al ŝi pri la gesinjoroj Brunner kaj la horloĝo, ne kaŝante sian fieron pri ĝi. Jen io bela, li diris.

Mankis al ŝi vortoj por precizigi la abomenon, kiun vekis en ŝi lia rakonto. Unue, lia vantemo; plue lia maldeco paroli pri homaj sentoj; tio estis blasfemo; neniu en la tuta mondo rajtas rakonti ion por pruvi, ke li amas siajn similulojn. Tamen, kiam li rakontis tion – kiel la maljunulo stariĝis por fari sian paroladon – larmoj aperis en ŝiaj okuloj; ho, se iu iam ajn dirus tion al ŝi! Sed malgraŭ tio ŝi sentis, ke ĝuste ĉi tio kondamnas la homaron por ĉiam; ili neniam atingos preter afektaj scenoj kun horloĝoj; Brunneroj parolante al Pricket Ellisoj, kaj la Pricket Ellisoj ĉiam ripetos, kiom ili amas siajn similulojn; ili ĉiam restos pigraj, kompromisemaj, kaj ĉiam timos belecon. Jen el kio fontas revolucioj; el pigro kaj timo kaj tiu amo al afektaj scenoj. Tamen ĉi tiu viro havas plezuron el siaj Brunneroj; dum ŝi estas kondamnita al eterna suferado pro siaj malriĉaj virinoj elfermitaj de ĝardenplacoj. Do ili sidis silente. Ambaŭ estis tre malfeliĉaj. Ĉar Pricket Ellis tute ne estis konsolita de tio, kion li diris; anstataŭ eltiri ŝian dornon, li premis ĝin enen; la feliĉo de lia mateno ruiniĝis. Fraŭlino O’Keefe estis konfuzita kaj ĉagrenita; ŝi estis nebula anstataŭ klara.

‘Mi timas, ke mi estas unu el tiuj tre ordinaraj homoj’, li diris stariĝante, ‘kiuj amas siajn similulojn.’

Je kio fraŭlino O’Keefe preskaŭ kriis: ‘Ankaŭ mi.’

Malamante unu la alian, malamante la tutan domon plenan je homoj, kiuj donis al ili ĉi tiun dolorigan, senluziigan vesperon, tiuj du amantoj de siaj similuloj ekstaris kaj sen eĉ unu vorto disiĝis por ĉiam.

La sinjorino en la spegulo

(The Lady in the Looking-Glass, 1929)

Reflekto

Homoj devus ne pendigi spegulojn surmure en siaj ĉambroj, same kiel ili devus ne lasi malfermitajn ĉeklibrojn, nek leterojn kun konfesoj pri abomena krimo. En tiu somera posttagmezo oni ne povis rezisti rigardi en la grandan spegulon pendantan ekstere en la vestiblo. Aranĝis tion la hazardo. El la profundo de la sofo en la salono oni povis vidi reflektitan en la itala vitro ne nur la marmorkovritan tablon starantan kontraŭe, sed krome pecon de la pli fora ĝardeno. Eblis vidi longan herbo-padon kondukantan inter randoj el altaj floroj, ĝis la ora kadro limigis ĝin kaj fortranĉis angulon.

La domo estis malplena, kaj estante sola en la salono oni sentis sin kiel unu el tiuj naturesploristoj, kiuj kuŝas kovritaj per herbo kaj folioj, gvatante al la plej timemaj bestoj – meloj, lutroj, alcionoj – libere moviĝantaj, dum ili mem restas nevidataj. Tiun posttagmezon la ĉambro estis plena de tiaj timemaj estaĵoj, lumoj kaj ombroj, blovataj kurtenoj, falantaj petaloj – aferoj neniam okazantaj, laŭŝajne, se iu rigardas. La kvieta malnova kampara ĉambro kun siaj tapiŝoj kaj ŝtonaj kamenkadroj, deklivaj librobretoj kaj ruĝe kaj ore lakitaj ŝrankoj, estis plena de tiaj noktaj estaĵoj. Ili piruetis ĉie sur la planko, tretis delikate per piedoj alte levataj kaj vosto etendataj kaj bekoj alude pikantaj, kvazaŭ ili estus grupoj aŭ aroj da elegantaj fenikopteroj kies roza koloro jam paliĝis, aŭ pavoj kies trenajoj estis arĝente vualitaj. Kaj krome estis obskuraj erupcioj kaj eklipsoj, kvazaŭ sepio subite plenigus la aeron per purpuro; kaj la ĉambro havis siajn pasiojn kaj furiozojn kaj enviojn kaj malĝojojn, kiuj ekregis kaj ombris ĝin kiel homon. Nenio restis senŝanĝa dum du sinsekvaj sekundoj.

Sed ekstere la spegulo reflektis la vestiblan tablon, la heliantojn, la ĝardenan padon tiel precize kaj firme ke ili ŝajnis seneskape tenataj tie en sia realeco. Estis stranga kontrasto – ĉi tie ĉio ŝanĝiĝanta, tie ĉio senmova. Ne eblis eviti rigardi jen unu jen la alian. Dume, ĉar ĉiuj pordoj kaj fenestroj estis malfermitaj pro la varmego, aŭdiĝis konstanta sono jen susura jen ĉesanta, la voĉo de efemero kaj neniĝo, laŭŝajne, kiu venis kaj foriris kvazaŭ homa spirado, dum en la spegulo aferoj jam ĉesis spiri kaj kuŝis senmove en la tranco de senmorteco.

Antaŭ duonhoro la mastrino de la domo, Isabella Tyson, iris laŭ la herbo-pado en sia malpeza somera robo, portante korbon, kaj malaperis, fortranĉite de la orita kadro de la spegulo. Verŝajne ŝi iris en la malsupran ĝardenon por pluki florojn; aŭ kio ŝajnis pli nature supozebla, por pluki ion malpezan kaj fantazian kaj folian kaj rampantan, klematidon aŭ unu el la elegantaj tigoj de konvolvulo, kiuj serpentumas laŭ malbelaj muroj por jen kaj jen eksplodi en blankajn kaj violkolorajn florojn. Ŝi sugestis la fantazion kaj la tremantan konvolvulon prefere ol la rektan asteron, la amelitan zinion, aŭ siajn proprajn brulajn rozojn, brilajn kiel lampoj sur la rektaj fostoĵoj de la rozarboj. La komparo montris kiel malmulte oni konis ŝin post tiom da jaroj; ĉar ne eblas ke iu ajn virino el karno kaj sango je aĝo de kvindek kvin aŭ sesdek efektive estus volvaĵo aŭ grimpaĵo. Tiaj komparoj estas pli malbonaj ol vantaj kaj supraĵaj – ili estas eĉ kruelaj, ĉar ili alvenas kiel la konvolvulo mem, tremante inter la okuloj kaj la vero. Necesas vero; necesas muro. Tamen estis strange ke koninte ŝin dum tiom da jaroj oni ne povis diri, kio estas la vero pri Isabella; oni daŭre elpensis frazojn kiel tiun pri konvolvuloj kaj klematidoj. Kiom koncernis faktojn, ŝi fakte estis fraŭlino; ŝi estis riĉa; ŝi iam aĉetis ĉi tiun domon kaj propramane kolektis – ofte en la plej obskuraj anguloj de l' mondo kaj je granda risiko de venenaj pikoj kaj orientaj malsanoj – la tapiŝojn, la seĝojn, la ŝrankojn, kiuj nun vivis sian noktan vivon antaŭ niaj okuloj. Kelkfoje ŝajnis kvazaŭ ili sciis pli multe pri ŝi ol kiom ni, kiuj sidis sur ili, skribis ĉe ili kaj tretis tre singarde sur ili, rajtis scii. En ĉiu el tiuj ŝrankoj

troviĝis multaj tirkestetoj, kaj preskaŭ certe ĉiu entenis leterojn, kunligitajn per rubandoj kun bantoj, surŝutitajn per lavendotigoj aŭ rozpetaloj. Ĉar alia fakto estis – se faktojn oni deziris – ke Isabella iam konis multajn homojn, iam havis multajn amikojn; kaj do se oni aŭdacus malfermi tirkeston por legi ŝiajn leterojn, oni trovus spurojn de multaj ekscitiĝoj, de interkonsentoj pri rendezuo, de skoldoj pro neveno al rendezuo, longajn leterojn de intimo kaj tenero, senbridajn leterojn de ĵaluzo kaj riproĉo, terure finajn vortojn de disiĝo – ĉar ĉiuj tiuj interkonsentoj kaj interparoloj kondukis al nenio – tio estas, ŝi neniam edziniĝis, kaj tamen, se juĝi laŭ la masko-simila indiferento de ŝia vizaĝo, ŝi travivis dudekoble pli da pasio kaj spertoj ol tiuj, kies amo estas distrumpetata por ke aŭdu la tuta mondo. Sub la premo de pensado pri Isabella, ŝia ĉambro fariĝis pli ombreca kaj simbola; la anguloj ŝajnis pli mallumaj, la piedoj de seĝoj kaj tabloj pli vergetaj kaj hieroglifaj.

Subite tiuj reflektaj finiĝis perforte kaj tamen sensone. Granda nigra figuro ekaperis en la spegulo; makulis ĉion, superŝutis la tablon per amaso da marmoraj tabuletoj vejnitaj de helruĝo kaj grizo, kaj malaperis. Sed la bildo komplete ŝanĝiĝis. Dum momento ĝi estis nereconebla kaj sensenca kaj tute eksterfokusa. Ne eblis ligi tiujn tabuletojn al ajna homa celo. Kaj poste laŭgrade ia logika proceso ekstraktis ilin kaj komencis ordigi kaj aranĝi ilin, kondukante ilin en la ŝafejon de komunaj spertoj. Oni finfine komprenis ke ili tutsimple estas leteroj. La servisto alportis la poŝtaĵojn.

Jen ili kuŝis sur la marmorkovrita tablo, unue inunditaj de lumo kaj koloro kaj krudaj kaj nesorbitaj. Kaj poste estis mirige vidi, kiel ili entiriĝis kaj aranĝiĝis kaj komponiĝis kaj fariĝis parto de la bildo kaj ricevis la senmovecon kaj senmortecon, kiujn atribuis al ili la spegulo. Jen ili kuŝis provizitaj per nova realeco kaj signifo kaj krome per pli granda pezo, kvazaŭ estus bezonata ĉizilo por forhaki ilin de la tablo. Kaj, ĉu tio estis fantazio aŭ ne, ili ŝajne fariĝis ne nur simpla manpleno da hazardaj leteroj sed tabuletoj sur kiuj estis gravuritaj eterna vero – se oni povus legi ilin, oni eksciis ĉion scieblan pri Isabella,

jes, kaj ankaŭ pri la vivo. La folioj interne de tiuj marmor-aspektaj kovertoj sendube estis profunde hakitaj kaj dense strekitaj per senco. Isabella envenis kaj prenis ilin unu post la alia, tre malrapide, kaj malfermus ilin, kaj legus ilin zorge vorton post vorto, kaj poste ŝi kun profunda suspiro de kompreno, kvazaŭ ŝi jam vidus ĉion ĝisfunde, ŝirus la kovertojn en pecetojn kaj kunligus la leterojn kaj ŝlosus la tirkeston de la ŝranko, kun rezoluta intenco kaŝi tion, pri kio ŝi deziris ke ĝi ne estu konata.

La penso funkciis kiel defio. Isabella ne deziris esti konata – sed ŝi ne plu povis eskapi. Estis absurde, estis horore. Se ŝi kaŝis tion kaj sciis tion, necesis rompe malfermi ŝin per la unua ilo trovebla – la imagpovo. Necesis fiksi sian menson al ŝi en tiu preciza momento. Necesis alligi ŝin tie sube. Necesis rifuzi esti plu forregalata per tiaj diroj kaj faroj, kiajn naskis la momento – per supeoj kaj vizitoj kaj ĝentilaj konversacioj. Necesis starigi sin mem ŝialoken, en ŝiajn ŝuojn. Se oni prenis la frazon laŭlitere, estis facile vidi la ŝuojn en kiuj ŝi staris ĉi-momente, en la malsupra ĝardeno. Ili estis tre mallarĝaj kaj longaj kaj laŭmodaj – ili estis faritaj el plej mola kaj fleksebla ledto. Kiel ĉio, kion ŝi surhavis, ili estis rafinitaj. Kaj kredeble ŝi staris sub la alta heĝo en la malsupra parto de la ĝardeno, levante la tondilon ligitan ĉe ŝia talio por detranĉi mortintan floron, trokreskintan branĉon. Sendube la suno brule trafis sur ŝian vizaĝon, en la okulojn; sed ne, je la preciza momento vualo el nubo kovris la sunon, igante la esprimon de ŝiaj okuloj dubema – ĉu ĝi estis moka aŭ tenera, ĉu sagaca aŭ stulta? Videblis nur la malpreciza konturo de ŝia sufiĉe velka, bela vizaĝo rigardanta la ĉielon. Eble ŝi pensis ke ŝi devas mendi novan reton por la fragoj; ke ŝi devas sendi florojn al la vidvino de Johnson; ke jam estas tempo veturi por viziti la familion Hipplesley en ties nova domo. Jen certe la aferoj, pri kiuj ŝi parolis dum vespermanĝo. Sed oni jam tediĝis de la aferoj, pri kiuj ŝi parolis dum vespermanĝo. Kion oni volis kapti kaj transformi en vortojn, estis ŝia pli profunda esenco, la esenco kiu signifas al la mensotio, kion la spirado signifas al la korpo, tio kion oni nomas

feliĉo aŭ malfeliĉo. Ĉe la mencio de tiuj vortoj sendube evidentiĝis ke ŝi ja estas feliĉa. Ŝi estis riĉa; ŝi estis renoma; ŝi havis multajn amikojn; ŝi vojaĝis – ŝi aĉetis tapiŝojn en Turkio kaj bluajn potojn en Persio. Avenuoj de plezuro radiis tien kaj ĉi tien de kie ŝi staris kun sia tondilo levita por detranĉi la tremantajn branĉojn, dum la puntaj nuboj vualis ŝian vizaĝon.

Jen per rapida movo de la tondilo ŝi stumpigis branĉeton de klematido, kaj la tondaĵo falis teren. Dum ĝi falis, certe ekbrilis ankaŭ iom da lumo, certe oni povus penetri ankoraŭ iom en ŝian esencon. Tiam ŝia menso estis plenigita de tenero kaj bedaŭro ... Detranĉi trokreskintan branĉon malĝojigis ŝin, ĉar ĝi iam vivis, kaj la vivo estis al ŝi kara. Jes, kaj samtempe la falo de la branĉo sendube vekis en ŝi la penson ke ŝi mem devos morti, kaj la tutan vanecon kaj efemerecon de ĉio. Kaj aliflanke, rapide interrompante tiun penson, ŝi tute prudente diris al si ke la vivo traktis ŝin favore; eĉ se ŝi devos fali, tio signifos kuŝi surtere kaj agrable malkomponiĝi inter la radikoj de violoj. Tiel ŝi staris pensante. Ŝi pensis nenion precizan – ĉar ŝi estis rezerviĝema persono, kies menso tenis la pensojn implikitaj en nuboj de silento – tamen plenigis ŝin pensoj. Ŝia menso estis kiel ŝia ĉambro, en kiu lumoj antaŭeniris kaj retiriĝis, delikate piruetis kaj tretis, etendis siajn vostojn, bekpikis sian vojon; kaj poste ŝia tuta esenco dronis, denove kiel la ĉambro, en nubon el ia profunda scio, ia nedirita bedaŭro, kaj poste plenigis ŝin ŝlositaj tirkestoj, plenaj de leteroj, kiel ŝiaj ŝrankoj. Paroli pri ‘rompe malfermi ŝin’, kvazaŭ ŝi estus ostro, apliki al ŝi ion ajn krom la plej delikataj kaj subtilaj kaj flekseblaj iloj, estus malpie kaj absurde. Necesis imagi – jen ŝi en la spegulo. Tio ekskuis onin.

Komence ŝi estis tiel fora ke ne eblis vidi ŝin klare. Ŝi alproksimiĝis malrapide, paŭzante, jen ŝi rektigis rozon, jen ŝi levis dianton por flari ĝin, sed ŝi neniam haltis. Kaj senĉese ŝi pli kaj pli grandiĝis en la spegulo, pli kaj pli komplete fariĝis la persono, en kies menson oni klopodis penetri. Oni identigis ŝin iom post iom – almetis la kvalitojn, kiujn oni malkovris, en ĉi tiun videblan korpon. Jen ŝia grize verda robo, kaj ŝiaj longaj ŝuoj, ŝia korbo, kaj jen io glima ĉe la kolo. Ŝi alvenis tiel

laŭgrade ke ŝi apenaŭ ŝanĝis la aranĝon en la spegulo, sed nur enkondukis ian novan elementon, kiu milde movis kaj modifis la aliajn objektojn, kvazaŭ ĝentile petante ilin doni spacon al ŝi. Kaj la leteroj kaj la tablo kaj la herbo-pado kaj la heliantoj atendantaj en la spegulo disiĝis kaj malfermis sin, tiel ke ŝi povis esti akceptata inter ili. Jen ŝi fine estis, en la vestiblo. Subite ŝi haltis. Ŝi staris apud la tablo. Ŝi staris absolute senmova. Tuj la spegulo komencis priverŝi ŝin per lumo, kiu ŝajnis fiksi ŝin; kiu ŝajnis kvazaŭ ia acido formordi ĉion neesencan kaj supraĵan, lasante nur la veron. Jen fascina spektaklo. Ĉio falis de ŝi – nuboj, robo, korbo, diamanto – ĉio kion oni nomis rampa planto kaj konvolvulo. Jen estis la malmola suba muro. Jen estis la virino mem. Ŝi staris nuda en tiu senkompata lumo. Kaj tie estis nenio. Isabella estis absolute malplena. Ŝi havis neniujn pensojn. Ŝi havis neniujn amikojn. Ŝi zorgis pri neniuj. Kaj ŝiaj leteroj estis nur fakturoj. Rigardu, dum ŝi staris tie, maljuna kaj osteca, vejna kaj sulkita, kun sia alta nazo kaj la falta kolo, ŝi eĉ ne zorgis malfermi ilin.

Homoj devus ne pendigi spegulojn surmure en siaj ĉambroj.

La serĉlumo

(The Searchlight, 1929-1941)

La sinjorino de duko el la dekoka jarcento estis ŝanĝita en klubejon en la dudeka jarcento. Vespermanĝinte en la ĉefa ĉambro kun kolonoj kaj kandeligoj sub intensa lumo, oni ĝuis eliri sur la balkonon, kiu rigardis al la parko. La arboj jam plene foliis, kaj se brilus la luno, eblus vidi la helruĝajn kaj kremkolorajn kokardojn de kaŝtanoj. Sed estis senluna vespero tre varma post bela somera tago.

La festenantoj de gesinjoroj Ivimey trinkis kafon kaj fumis surbalkone. Kvazaŭ por liberigi ilin de la devo paroli, por distri ilin sen ajna peno iliaflanke, faskoj el lumo rondiris tra la ĉielo. Tiam estis paco; la aerdefendo ekzercis, serĉante malamikajn aviadilojn en la aero. Paŭzinte por esplori iun suspektindan punkton, la lumo rondiris kiel flugiloj de ventmuelejo, aŭ eble kiel antenoj de ia giganta insekto, malkaŝante jen kadavre palan ŝtonfasadon, jen kaŝtanojn kun amaso da ŝvebantaj floroj; kaj jen subite la lumo trafis rekte la balkonon, kaj dum momento brilis hela disko – eble ĝi estis spegulo en la mansako de iu sinjorino.

‘Rigardu!’ ekkriis sinjorino Ivimey.

La lumo pasis. Denove ili estis en mallumo.

‘Vi neniam povus diveni, kion *tio* vidigis al mi!’ ŝi aldonis.

Sed kompreneble ili provis.

‘Ne, ne, ne’, ŝi protestis. Neniu povis diveni; nur ŝi sciis; nur ŝi povis scii, ĉar ŝi estis pranepino de la viro mem. Li rakontis al ŝi sian historion. Kiun historion? Se plaĉus al ili, ŝi provus rakonti ĝin. Ankoraŭ restis tempo antaŭ la teatraĵo.

‘Sed kie mi komencu?’ ŝi cerbumis. ‘Ĉu en la jaro 1820? ... Sendube proksimume tiam mia praavo estis knabo. Mi mem ne plu estas juna’ – ne, sed ŝi estis tre bonstata kaj bonaspekta – ‘kaj li estis tre maljuna viro, kiam mi estis infano. Tre bela maljunulo kun tufo da blankaj haroj kaj blujaj okuloj. Certe li

iam estis bela knabo. Sed kurioza ... Tio estis tute natura', ŝi klarigis, 'se konsideri, kiel ili vivis. La familia nomo estis Comber. Ili malprosperis en la vivo. Iam ili estis sinjoroj, kiuj posedis teron norde, en Jorkŝiro. Sed kiam li estis knabo, restis nur la turo. La domo estis nenio krom eta biendomo, staranta meze de kampoj. Ni vizitis ĝin antaŭ dek jaroj kaj trairis ĝin. Ni devis lasi la aŭton por paŝi tra la kampoj. Neniu vojo atingas la domon. Ĝi staras tute sola, herboj kreskas eĉ ĝis la pordego ... kokidoj bekadis ĉie, kurante enen kaj elen tra la ĉambroj. Ĉio kadukiĝis en ruinon. Mi memoras, ke ŝtono subite falis de la turo.' Ŝi paŭzis. 'Jen ili vivis', ŝi daŭrigis, 'la maljunulo, la virino kaj la knabo. Ŝi ne estis lia edzino, nek patrino de la knabo. Ŝi estis nur bienservistino, knabino kiun la maljunulo prenis por vivi kun li, post la morto de lia edzino. Jen eble kroma kaŭzo, kial neniu vizitis ilin – kial la tuta loko kadukiĝis en ruinon. Sed mi memoras blazonon super la pordo; kaj librojn, malnovajn librojn, kiuj jam estis ŝimaj. Li lernis ĉion, kion li sciis, el libroj. Li legis kaj legadis, li diris al mi, malnovajn librojn, librojn kun mapoj elpendantaj de la paĝoj. Li trenis ilin supren al la pinto de la turo – ankoraŭ restas ŝnurego kaj rompitaĵoj ŝtupetoj. Ĉe la fenestro ankoraŭ staras seĝo kun elfalinta fundo; kaj la fenestro svinge malfermiĝas kun rompitaĵoj vitroj, kaj panoramo trans multajn mejlojn da erikejoj.'

Ŝi paŭzis, kvazaŭ starante pinte de la turo, rigardante tra la fenestro kiu svinge malfermiĝas.

'Sed ni ne povis trovi la teleskopon', ŝi diris.

En la manĝejo malantaŭ ili la tintado de teleroj plilaŭtiĝis. Sed surbalkone sinjorino Ivimey ŝajnis konfuzita, ne povante trovi la teleskopon.

'Kial do teleskopo?' iu demandis ŝin.

'Kial? Ĉar se ne estus teleskopo', ŝi ridis, 'mi nun ne sidus ĉi tie.'

Kaj certe ŝi ja nun sidis tie, virino mezaĝa kaj bonstata, kun io blua super la ŝultroj.

'Ĝi nepre estis tie', ŝi rekomencis, 'ĉar ĉiunokte, li diris al mi, kiam la plenkreskuloj enlitiĝis, li sidis ĉe la fenestro,

rigardante stelojn tra la teleskopo. Jupiteron, Aldebaranon, Kasiopeon.’ Ŝi gestis permane al la steloj, kiuj komencis aperi super la arboj. Jam pli mallumiĝis. Kaj la serĉlumo ŝajnis pli intensa, balaante la ĉielon, paŭzante jen kaj jen por gapi al la steloj.

‘Jen ili estis’, ŝi daŭrigis, ‘la steloj. Kaj li demandis sin, mia praavo – tiu knabo: “Kio ili estas? Kial ili estas? Kaj kiu estas mi?” kiel oni faras, sidante sola, kun neniu al kiu paroli, rigardante la stelojn.’

Ŝi silentis. Ili ĉiuj rigardis la stelojn, kiuj ekaperis tra la mallumo super la arboj. La steloj ŝajnis tre ĉiamaj, tre senŝanĝaj. La muĝado de Londono fadis. Cent jaroj ŝajnis nenio. Ili sentis, ke la knabo rigardas la stelojn kun ili. Ili ŝajnis esti kun li, en la turo, rigardante foren trans erikejojn al la steloj.

Tiam voĉo malantaŭ ili diris:

‘Vi tute pravas. Vendrede.’

Ili ĉiuj turnis sin, ŝanĝis teniĝon, sentis sin refaligitaj suben sur la balkonon.

‘Nu, sed tie ekzistis neniu por diri al li tion’, ŝi murmuris. La duopo stariĝis kaj promenis for.

‘*Li estis sola*’, ŝi rekomencis. ‘Estis bela somera tago. Junia tago. Tia perfekta somera tago, kiam ĉio ŝajnas senmova en la varmego. Jen la kokidoj bekadis sur la korto; la maljuna ĉevalo stamfis en la stalo; la maljunulo dormetis super sia glaso. La virino broslavis sitelojn en la lavejo. Eble ŝtono falis de la turo. Ŝajnis, kvazaŭ la tago neniam finiĝos. Kaj li havis neniun al kiu paroli – nenion entute por fari. La tuta mondo etendiĝis antaŭ li. La erikejo altiĝis kaj malaltiĝis; la ĉielo renkontis la erikejon; verdo kaj bluo, verdo kaj bluo, ĉie kaj ĉiam.’

En la duonlumo videblis, ke sinjorino Ivimey klinas sin de la balkono, kun la mentono apogita al la manoj, kvazaŭ rigardante foren trans erikejojn el la pinto de turo.

‘Nenio krom erikejo kaj ĉielo, erikejo kaj ĉielo, ĉie kaj ĉiam’, ŝi murmuris.

Poste ŝi faris movon, kvazaŭ svingante ion en pozicion.

‘Sed kiel aspektis la tero tra la teleskopo?’ ŝi demandis.

Ŝi faris duan rapidan moveton per la fingroj, kvazaŭ tordante ion.

‘Li alĝustigis ĝian fokuson’, ŝi diris. ‘Li enfokusigis la teron. Li enfokusigis malhelan amason el arbaro ĉehorizonte. Li enfokusigis ĝin, tiel ke videblis ... ĉiu arbo ... ĉiu arbo aparte ... kaj la birdoj ... kiuj altiĝis kaj malaltiĝis ... kaj strio el fumo ... jen ... meze inter la arboj ... Kaj poste ... pli sube ... sube ... (ŝi subigis siajn okulojn) ... jen domo ... domo inter la arboj ... farmeja domo ... ĉiu briko videblis ... kaj kuvoj ambaŭflanke de la pordo ... kun floroj en ili, bluaj, rozaj, eble hortensioj ...’

Ŝi paŭzis. ‘Kaj poste knabino venis el la domo ... kun io blua sur la kapo ... kaj ŝi staris tie ... nutrante birdojn ... kolombojn ... ili batadis per la flugiloj ĉirkaŭ ŝi ... Kaj tiam ... rigardu ... Jen viro ... Viro! Li venis de trans la angulo. Li brakumis ŝin! Ili kisis ... ili kisis unu la alian.’

SinJORINO Ivimey malfermis siajn brakojn kaj fermis ilin kvazaŭ kisante iun.

‘Unuafoje li vidis viron kisi virinon – tra la teleskopo – multajn mejlojn malproksime trans la erikejoj!’

Ŝi ŝovis ion for de si – supozeble la teleskopon. Ŝi sidis kun rekta dorso.

‘Do li kuris suben laŭ la ŝtuparo. Li kuris tra kampoj. Li kuris laŭ vojetoj, sur la ĉefŝoseon, tra arbaroj. Li kuris multajn mejlojn, kaj ĝuste kiam la steloj ekaperis super la arboj, li atingis la domon ... kovrita per polvo, naĝanta en ŝvito ...’

Ŝi haltis kvazaŭ vidante lin.

‘Kaj poste, kaj poste ... kion li faris poste? Kion li diris? Kaj la knabino ...’ ili instigis ŝin.

Lumradio falis sur sinJORINON Ivimey, kvazaŭ iu enfokusigus ŝin per la lenso de teleskopo. (Tio estis la aerdefendo serĉanta malamikajn aviadilojn.) Ŝi stariĝis. Ŝi portis ion bluan surkape. Ŝi levis la manon, kvazaŭ starante ĉe pordo, mirante.

‘Ho, la knabino ... Ŝi estis mi –’ ŝi hezitis, kvazaŭ dironte ‘mi mem’. Sed ŝi rememoris, kaj korektis sin. ‘Ŝi estis mia praavino’, ŝi diris.

Ŝi turnis sin por serĉi sian mantelon. Ĝi kuŝis sur seĝo malantaŭ ŝi.

‘Sed rakontu al ni – kio pri la alia viro, la viro, kiu venis de trans la angulo?’ ili demandis.

‘Kiu viro? Ho, tiu viro’, sinjorino Ivimey murmuris, kliniĝante por palpi sian mantelon (la serĉlumo jam forlasis la balkonon), ‘mi supozas, ke li malaperis.’

‘La lumo’, ŝi aldonis, kolektante siajn aferojn ĉirkaŭ si, ‘falas nur jen kaj jen.’

La serĉlumo jam plupasis. Ĝi nun enfokusigis la klaran fasadon de Buckingham Palace. Kaj jam estis tempo iri al la teatraĵo.